

TEA-BULTENO

7^A JARO

JULIO - AŬGUSTO 2004

NUMEROJ 7-8



Bonan somerumadon per Esperanto!

Jen finfine komenciĝas la feriad-periodo! Momentoj de malstreĉiĝo, de amuziĝo, de nenifarado staras antaŭ ni kaj tiun, pli aŭ malpli, longan tempon ni klopodos ĝue kaj gaje uzadi kiel eble plej profite. Elektobloj tute ne mankas, precipe en nia esperantomondo. Nu, sufiĉas havi emon turismadi kaj ankaŭ ... monon! Sed por ni esperantistoj fojfoje eĉ ne tiom pezas la mona problemo, ĉar, ekzemple, profitante de PASPORTA SERVO, per malmulta elspezo oni povas vizitadi multajn interesajn lokojn tra la mondo, ĝuante precipe esperantistan kunestadon.

Se ankoraŭ vi ne decidis vian cel-lokon, en ĉi numero de TEA-bulteno vi trovos kelkajn sugestojn: ĉio dependas de viaj apartaj intereso! Mi esperas, ke vi akceptos la konsilojn kaj iom vagados tra nia Esperantujo: vi ne nur plikleriĝos dank' al interkonatiĝo kun fremdaj landoj, sed pliriĉiĝos intime dank' al interpersona kontakto kun homoj de diversaj kulturoj kaj plurfacetaj kutimoj.

Bonan someran tempon al vi ĉiuj kaj
ĝis la revido en septembro!

ATENTU! ATENTU! ATENTU!

TEA-sidejo estos fermita ekde la 10^a de julio ĝis la 31^a de aŭgusto. Bonan feriadon al vi ĉiuj kaj rebonvenon je la 3^a de Septembro!

En septembra programo jam antaŭviditaj estas unuagrada kaj duagrada kursoj, "Ni provu interpretadi", la jam tradicia esplorado de TEA-arkivo, kuna tradukekzercado de esperanto al itala, projekciado de diapozitivaj kaj filmoj pri nia somerumado tra la mondo kaj ... ĉio ajn kion vi ŝatos proponi al ni.

Unua ekster-TEA programero estos la grimrado pinten de Monto *Forno*, apud *Arnoldstein*, dimanĉon, la 12^{an} de septembro, por la tradicia Festo de Amikeco.

Programo en Tea - Julio

02 - vendredo	h. 20.00 - Kartludado
06 - mardo	h. 20.00 - Esplorado en TEA-arkivo
09 - vendredo	h. 20.00 - Somera Festo en TEA kaj... ĝis revido la 3 ^{an} de septembro!

KVIZO Kia bedaŭro! 50-eŭra monbileto restis en la poŝoj de la kviz-proponinto! La konkurso pri anagramoj de italaj urbnoj mizere fiaskis, ĉar neniu kuraĝis partopreni. Ĉu vere neniu klopodis iom cerbumadi super ĝi?

Kie libertempadi en Esperantujo?

72^a Itala Kongreso de Esperanto
03-07 septembro 2004 - Treviso

25 Landoj: eblas facila dialogo en Eŭropo

La kongreso daŭros de la posttagmezo de la 3^a ĝis la vespero de la 6^a de septembro. La 7^{an} kaj la 8^{an} okazos du tuttagaj ekskursoj. Jen la proponitaj ekskursoceloj:

1. Urbocentro de Treviso; 2. Fanzolo, Asolo, Possagno kaj Maser; 3. Vilao Pisani en Stra (Ve); 4. Venecio (per boato laŭ la Granda Kanalo). Se vi jam nun deziras konatiĝi kun Treviso, eblas viziti la retejojn: <http://www.trago.it> kaj www.trevisoweb.com.

Petu informojn kaj/aŭ sendu aliĝilon al
Prezidanto de LKK Flavia Dal Zilio
Via Cappella, 17 - 31059 Zero Branco TV
flavia.dalzilio@esperanto.it

Aliĝiloj kaj detaloj haveblas ankaŭ ĉe TEA-sekretario

37^a ILEI-Konferenco

14-21 aŭgusto 2004—Bratislava, Slovakio


KULTURA KAJ LINGVA DIVERSECO EN EDUKADO

Programo: ĝi estos plena je interesaj prelegoj kaj diskutoj, komitatkunsidoj, seminarieto pri Interkulturo, sesioj pri Esperanto-instruado, Lingva Festivalo kaj ekskursoj!

Konferenca urbo: Bratislava estas la ĉefurbo de Slovakio, kun proksimume 450.000 loĝantoj. Ĝi estas ankaŭ la ekonomia kaj kultura centro de la lando. Ĉi tie troviĝas multaj lernejoj kaj pluraj alternejoj. La situo de la urbo estas tre interesa: inter la rivero Danubo sude kaj la montaro Malgrandaj Karpatoj norde. La historia centro estas malgranda, sed turisme alloga. La klimato ĉi tie estas modera, konvena por turismo.

Tranoktejoj: Eblos tranokti ĉe CITY HOTEL BRATISLAVA aŭ en Studenta Hejmo. En la hotelo, je dispono ĉambroj 1- kaj 2-litaj; en ĉiu ĉambro necesejo kaj duŝejo. Kostoj: unulita ĉambro = € 48,00 tage, loko en 2-lita ĉambro € 29,00. La prezo de tranoktado en la hotelo inkluzivas la matenmanĝon. En la Studenta Hejmo la ĉambroj estas 1-, 2- kaj 3-litaj. Necesejo kaj duŝejo estas komunaj kaj troviĝas en la koridoro. Kostoj: unulita ĉambro = € 12,00; loko en 2-lita ĉambro = € 7,00; loko en 3-lita = € 5,00 tage, sen matenmanĝo. Loĝantoj en la studenta hejmo devas mem porti mantukojn.

Konferenceto: Gimnazio kaj Elementa lernejo de S. Vincent de Paul. Pliaj detaloj ĉe itala ILEI-sekciestro **Luigia Oberrauch Madella**-Via Prampolini 8 - 43100 Parma— tel/fax: 0521 785582 - silkovojo@aliceposta.it
Pliaj infomoj ĉe <http://ikso.net/ilei/index.php?lingvo=eo>
kaj poste kliku sur programo_bratistava.doc



Internacia Esperanto-Konferenco en Pécs, Hungario

17-23 julio 2004

Temo: La esperanta gazetaro

Klera kaj kleriga kunveno, dum kiu prelegos gravaj kaj fame konataj esperantistoj!

- ★ Gerrit Berveling: Fonto, la revuo kaj la eldonejo
- ★ Ed Borsboom: la Praktiko de Andreo Cseh—
Prezento de “Vivo de Andreo Cseh”
- ★ Maria Butan: 100 jaroj de rumania E-Gazetaro
- ★ Ottó Haszpra: La scienca gazetaro en Esperantujo
- ★ Vinko Oslak: Ĉu la esperanto-gazetaro aperas nur en Esperanto?
- ★ Spomenka Štimec: Prezento de la propra verkaro -
Gvidado tra la Esperanto-Gazetaro en Kroatio
Antaŭ- kaj postkonferencaj kulturaj tagoj en Kroatio
Informoj kaj aliĝoj ĉe Orbis Pictus—orbispictus@iol.it
<http://osiek.org>

Dum la konferenco okazos la atribuo de OSIEK-premio. La ĉijare plej ofte proponitaj kandidatoj estas:

- ★ William Auld por la traduko “La Mastro de l’ringoj”
- ★ Ed Borsboom por “Vivo de Andreo Cseh”
- ★ André Cherpoillod por “Konciza etimologia vortaro”
- ★ Enrico Dondi por la traduko de “Purgatorio”
- ★ Spomenka Štimec por “Geografio de miaj memoroj”

Pliajn informojn pri ĉio ĉi vi povas legi en LA GAZETO, kultura kaj bonstila periodaĵo majstre redaktata de Eugène de Zilah. En la kunlaborantara rondo troviĝas la plej renomaj nomoj el nia tutmonda esperantistaro. En la lasta numero aperis artikoloj de: Nicolino Rossi pri vivo kaj verko de Petrarko, Trevor Steele, Eugène de Zilah pri la fama hungara pentristo Csontváry, Lina Gabrielli kaj multaj aliaj.

Ĉu vi ne konas ĉi tiun publikaĵon? Ĉu neniam vi ĝin legis? Nu, mi povas vin helpi: petu ekzempleron de la peranto en Italio, kaj ekgustumu ĝin! Se tion vi faros, mi certas ke vi deziros havi tiun “frandaĵon” sur via tablo dum la tuta jaro.

Peranto por Italio:

Elda Doerfler—Via del Bosco 24—34131 Trieste
Poŝtkonto 17452996; testudo@adriacom.it

De la 23^a ĝis la 26^a de septembro okazos en Pliskovica, apud Sežana (280 m), la 15^a MKR—MontKabana Renkontiĝo. Pliajn informojn petu de Vanja Radovanović, Paljetkova 8-10000 Zagrebo; vanja.radovanovic@etk.ericsson.se; aŭ de TEA-sekretario.

ĈU IMITINDA? CERTE KE JES!

Ni lernu de Brazilanoj! Traduki por loka gazeto...

Campos estas brazila urbo, situanta ĉ. 400 km-ojn for de Rio. Tie ekzistas E-klubo, kies membroj faras tre interesan laboron, kiu donas prestiĝon al Esperanto en la loka medio. Ĉiusemajne oni elektas artikolon el gazeto (precipe MONATO). Tiam unu el la klubanoj estas taskigita traduki ĝin al la portugala. La sekvan semajnon aliaj klubanoj revizias la faritan laboron kaj ĝin sendas al la plej grava gazeto de la urbo, kiu publikigas la artikolon kaj mencias, ke ĝi estis originale verkita en Esperanto kaj aldone informas pri la adreso de la loka klubo.

Informis Aloisio Sartorato Rete: ludoviko44@yahoo.com.br

Mallonge pri...

Medikamenta firmao informas en Esperanto

La germana firmao Meckel-Spenglersan GmbH, kiu produktas naturkuracajn medikamentojn, informas sur siaj retpaĝoj ankaŭ en Esperanto. La adreso estas: <http://www.spenglersan.de>.

Informis Harald Schicke rete: MZVerlag@web.de

Esperantistino en EU-parlamento! La edzino de Georgo Handzlik (*bardo sen barbo*), Margareta, estas elektita eŭropa parlamentano de Pollando! Do, elektigis esperantistino! Ŝian retpaĝon vi povas trovi ĉe <http://www.malgorzatahandzlik.com> kaj tie estas ligo “esperanto” sub kiu troviĝas ŝia sinprezento esperantlingva.

Esperanto en eŭropaj balotoj en Francio La listo EŬROPO DEMOKRATIO ESPERANTO prezentita de esperantistoj en Francio por la eŭrop-unia baloto, ricevis pli ol 25 000 voĉdonojn, t.e. 0.15%. Vizitu: <http://e-d-e.org/>
Thorsen-apogo por Bibliotekoj UEA disdonos jam por la oka fojo subvenciojn al Esperanto-bibliotekoj el la BIBLIOTEKA APOGO ROMA KAJ POUL THORSEN. Rajtas peti subvenciojn Esperanto-bibliotekoj, kiuj ne estas subtenataj de ŝtata, urba aŭ alia publika instanco. La petojn devas akompani listo de dezirataj libroj, ordigita laŭ prefero. Diskoj, sonkasedoj, vidbendoj, k.a. ne-libraj varoj ne estas subvencieblaj. La subvenciojn oni ricevos kiel librojn surbaze de la sendita listo. Ĉio ĉi devas atingi la Centran Oficejon de UEA plej laste la 1^{an} de novembro 2004.

Memore al la 150a kurso de Seula Esperanto-Kulturcentro La Korea Kulturcentro festos, la 3^{an} de julio 2004, la okazigon de la 150a Kurso: oni ekinstruis en novembro 1991. Sume oni kalkulis, ke lernis Esperanton, sub la gvidado de LEE Jung-kee, 1180 civitanoj. Dum la festo, d-ro LEE Chong-yeong prelegos pri lingvo-problemo en nuna mondo. Bonvenas viaj gratulmesaĝoj por la memorkunsido: esperant@unitel.co.kr—
hejmpaĝo: www.esperanto.co.kr

BORSA TERMINARO KVINLINGVA Laste aperis BORSA TERMINARO kvinlingva (germana - angla - esperanta - franca - nederlanda) de Hans Wiersch - 137 paĝoj, A4-formata, prezo 9 € + afranko. Mendoj ankaŭ ĉe <http://retbutiko.esperanto.be>. Pri ĝi komentis Franz Josef Braun: “Per sia BORSA TERMINARO Hans Wiersch fermas truegon en la Esperantaj terminaroj pri ekonomio kaj komerco”. Kaj Hans Wiersch mem: “Ĉi tiu terminaro volas helpi ne nur al nespecialistoj sed same al fakuloj por internacie trovi grandan nombron da terminoj”.

Premio-mencio al Vikipedio Esperanto. La multlingva, libere konstruata, reta enciklopedio ricevis Premion ARS ELECTRONICA en la internacia konkuro por kiberartoj. En la prezentoteksteto pri Vikipedio, Esperanto estas aparte menciita kiel rimarkinda fenomeno en la multlingva projekto kun pli ol kvindek lingvoj.

Informis Arno Lagrange Rete: Arnaud.LAGRANGE@wanadoo.fr

Brokantaĵoj en <http://katalogo.uea.org> Nova servo de la reta Katalogo de UEA “brokantaĵoj” iĝis plene uzbla ekde nun. En tiu ĉi parto de la plej riĉa interreta Esperanto-librovendejo troviĝas preskaŭ 950 titoloj, ĉefe verkoj eldonitaj antaŭ kelkaj jardekoj kaj ne plu haveblaj. Vi estas bonvenaj! La kompleta adreso estas:

<http://katalogo.uea.org/index.php?st=brok>

Da novaj Zeo-j en Italio

S. Vito al Tagliamento: Antonio Paulet, eldonisto kaj pioniro de disvastigo de Esperanto en Italio

Sabate la 29^{am} de majo, per simpla ceremonio, strato en la nova kvartalo *Trevisan* estis titolita al Antonio Paulet (1880-1960), tipografo kaj eldonisto. Ĉeeste de hon. Di Bisceglie, la esperantista pastro Nello Marcuzzi el Udine benis la tabulon, kovritan per la standardo de la unua Esperanto-Grupo en Udine kaj poste malkovritan de la nepo Antonio.

Iom antaŭe, en la konsilantara salono de Urbodomo, post bonvenigvortoj de la skabeno pri Kulturo Gennaro Di Bisceglie, Carlo Minnaja, profesoro ĉe la Padova Universitato, prezentita de Edvige Tantin Ackermann, prezidanto de Triesta Esperanto-Asocio, ilustris al multnombra publiko, la agadon de ANTONIO PAULET, UNUA ESPERANTISTA ELDONISTO EN ITALIO, utiligante ankaŭ bildojn el la vasta dokumentaro, kolektita de Giacomino Martinez, dum ties esploroj pri historio de Esperanto en Friulo.

Per sia simpla laboro de tipografo, Antonio Paulet rimarkinde kontribuis al progreso kaj evoluado de la Esperanto-Movado, naci- kaj internaci-skale.

Li konatiĝis kun Esperanto dum la 4^a Universala Kongreso en Dreseno, Germanio – kie li troviĝis pro laboraj kaŭzoj – kaj reveninte al Italio li ekrilatis kun la plej elstaraj tiamaj gravuloj, inter kiuj pastro Giacomo Bianchini kaj la prezidanto de ITALA KATEDRO DE ESPERANTO, prof-ro Grazzini. En 1913 li ekeldonis la duonmonatan revuon L'ESPERANTO, kiu poste fariĝis oficiala organo de ITALA ESPERANTO-FEDERACIO.

El lia tipografiejo eliĝis gramatikoj, vortaroj, verkoj de italaj aŭtoroj esperanten tradukitaj, kiuj tra la mondo difamigis la nomon de Antonio PAULET (anstataŭ PAULET, je la komenco erare presita kaj neniam poste korektita) kaj de *S. Vito al Tagliamento*, urbo rigardata kiel lulilo de Esperanto en Italio.

La kleran prelegon de prof-ro Minnaja emfazis la intensaj memoroj de la filino de kav. Paulet, Giuseppina, (kiu la 10^{am} de junio festis sian 92-jariĝon), kies vervaj komentoj la bildojn plivigligis.

En saloneto apud la konsilia ĉambro, estis ekspoziciita vasta kolekto de la ellaboraĵoj de la eldonisto, kiujn, ĉiokaze, familio Paulet donacis al la Komunuma Biblioteko.

Viglo

Bolzano Pasintan 14^{am} de majo, posttagmeze, okazis en Bolzano oficiala ceremonio, dum kiu oni inaŭguris 37 novajn stratojn.

Surprize, multnombra esperantistaro ĉeestis tiun kunvenon, tiom ke ĝi ŝajnis nacia kongreso. En la granda reprezentanta salono de la Bolzana Komunumo, estis disdonita 80-paĝa libro, en kiu detale oni dokumentis pri la stratoj kaj ties nomigoj ankaŭ helpe de pluraj fotoj: la teksto estis du-lingva, itala kaj germana.

En la enkonduka prezento far la urbestro de Bolzano, interalie oni povas legi: "... Aliaj stratoj honoras la bonfarantojn de la Komunumo. Kaj ne povis manki sur nia teritorio, estima signo al Esperanto, la universala lin-

gvo". Kaj tiun ideon li, iom poste, pli bone esprimis per sia malferma parolado. Klarigado pri toponimio kaj pri la stratoj okazis per koncerna projekciado sur giganta ekrano: amplekse oni informis pri la elekto-kialoj de la nomoj por la 37 stratoj.

Al la Esperanto-grupo de Bolzano, tie reprezentita de Lea Fabbri kaj Karl Behmann, oni transdonis memorŝildon. Antaŭ la nombra publiko Karl Behmann dankis la Komunumon de Bolzano kaj ankoraŭ ion aldonis rilate al Esperanto.

Ĉi tiu okazaĵo prezentis vere inde kaj sukcese nian aferon, antaŭ la kultura kaj industria medioj de tiu urbo.

Substrekindas la vortoj de Lea Fabbri, laŭ ŝia raporto pri la agado de la Bolzana Esperanto-Katedro: "En la pasintaj jaroj plurajn fojojn oni prezentis peton pri titoligo de strato al Esperanto, kaj nun, finfine, danke al la firma kaj persista insistemo de inĝ. Karl Behmann, inĝ. Renzo Segalla kaj s-ro Franz Knoflach, kiuj tre fidoplene konkrete agadis por tio, VIA ESPERANTO iĝas realaĵo".

La ĉefa laboro de la tri iniciatintoj estis precipe tiu konstanta, senĉesa sendado de opini-leteroj al la regiona gazetaro, ital- kaj german-lingve, kio certe kontribuis al pli vasta kaj objektiva informado pri esperanto kaj sekve al atingo de tiu ĉi rezulto tiel longe revita.

Jen imitinda kaj sekvinda ekzemplo por esperantistoj el aliaj italaj urboj, kiel meza etapo sur la vojo de interhoma paco kaj tutmonda justeco, al kiuj, antaŭ pli ol 120 jaroj, Ludoviko Zamenhof celis, per sia Esperanto.

Dante Chierico – Schio (trad. de E. Doerfler)

Tiu ĉi la opinio de la ĵurnalisto Jas Gawbronski, aperinta en la revuo PANORAMA, la 15^{am} de aprilo 2004.

Tradukhaoso en Eŭropa Unio

Kolizio interlingva

Samtempa interpretado riskas kaŭzi diplomaciajn krizojn



Traduki ĉiam signifas iel perfdi: pri tio bone konscias kiu legas en origina lingvo tekstojn de gravaj aŭtoroj, por iom pli poste relegi la samajn en iu alia tradukversio - kioma diferenco! Kaj nun imagu, ene de tiu Babel-turo kia estas nia Eŭropa Unio, baldaŭ konsistanta el 25 landoj: kiomaj perfidoj de

pensoj, de decidoj, de rezolucioj!

En estonteco, ne estos tiom la gravaj politikaj decidoj kiuj renversos la historion, sed pli timigaj estos la samtempaj tradukadoj. Parlamentanoj rapidege parolantaj por havi eblon ĉion prezenti ene de la disponigita du-minuta tempo, tradukistoj postkurantaj la signifon de frazoj eldiritaj de iu finna parolanto aŭ de iu greka deputito, esprimanta sin en iu monstre fuŝita angla lingvaĵo. Kaj la rezultoj? Foje iom surrealaj, foje vere danĝeraj por la pacaj rilatoj internaciaj. Silvio Berlusconi asertis, ke lia "spritajo" pri naziismo kaj "kapo", elbuŝigita de interpretisto sen humura sento, iĝis, vole-nevole, interŝtata problemo.

En la Eŭropa Parlamento jam oni estas ekopiniantaj, ke ne la militaj formacioj aŭ la disputado inter la estroj faros aŭ malfaros la mondan historion, sed, male, la armeoj da tradukistoj batalantaj sur la idioma kampo.

ĈU LA ANGLA JAM VENKIS?



Respondo de Seán Ó Riain, irlanda diplomato en Berlino, al homoj, kiuj sincere kredas ke la angla jam gajnis, ke "la vagonaro jam forvojaĝis", kiel diras multaj, kiuj ne malsimpatias kun Esperanto, sed kredas ke estas tro malfrue.

Kiel irlandano, mi povus respondi, ke eĉ ĉe ni, kie ni eble antaŭas la ceteran Eŭropon ĉar ĉiuj jam parolas flue angle kaj la plimulto perdis la propran irlandan lingvon jam de kvar generacioj, granda movado daŭre luktas por la irlanda kaj ĝuste NE akceptas la aserton, ke la angla jam venkis

1. Naciaj lingvoj similas al bestoj, kaj la angla, nuntempe la plej forta, al leono. Akcepti la nuntempan dominadon de la angla, nur ĉar ĝi estas fakto, similus al akcepto de situacio, ke ĉiuj bestoj en la bestoĝardeno vagu senkatene, nur ĉar ili rompis siajn kaĝojn. En tiu kazo la mortigo de ĉiuj aliaj bestoj fare de la leonoj samtiom certas kiom la mortigo de ĉiuj aliaj lingvoj, se la nuna internacia uzo de la angla rajtus daŭri senbride.
2. Estas hipokrite ŝajniĝi, ke oni ne komprenas tion: "Domaĝe ke la aliaj bestoj/lingvoj ne estis sufiĉe fortaj por konkurenci kun la leonoj/angla en libera merkato. Ilia morto nur pravigas la superecon de la leonoj/angla." Kiam ni havas grandegajn diferencojn de forto inter lingvoj, kiel nun, estas la leĝo kiu liberigas, kaj la senbrida libereco kiu subpremas.
3. La angla kiel internacia lingvo similas al la unua amasproduktita aŭto, la MODEL T FORD: ĝi signifis multe pli bonan situacion kompare al la antaŭa, sed kiu nuntempe ŝatus ŝanĝi sian novan BMW kontraŭ MODEL T FORD? Esperanto, kiel internacia lingvo (kaj mi substrekas internacia), estas la plej moderna BMW, aviadilo aŭ biciklo, laŭ via gusto.
4. La angla similas al ruĝa rozo, bela kaj tre ŝatata floro. Sed kiu ŝatus ĝardenon plenan de ruĝaj rozoj, kun neniu alia floro? Al tia lingva ĝardeno kondukas la nuntempa senregula internacia uzo de la angla.
5. Ankaŭ la franca *venkis* antaŭ unu jarcento. Latino *venkis* antaŭ 2000 jaroj, sed kie ĝi estas nun? Malgraŭ la anglalingva *venko*, por komerci en Ĉinio, oni lernu la ĉinan.
6. Ĉu ĉiuj eŭroparlamentanoj regas la anglan? Se jes, por kio utilas tie la interpretistoj? Se ne, kie ĝi fakte *venkis*?
7. Anglalingvano en Mongolio povas, eble, atingi sian hotelon per la angla; Esperantisto povas diskuti kun mongoloj pri la mongola kulturo Esperante.
8. Se iu fanfaronas pri sia altnivela scipovo de la angla, proponu ke li klarigu angle: A. Kiel funkciigi veturilon? B. Kiel fari terpomano omleto? Meznivela esperantisto, post kelkaj monatoj de diligenta lernado, kapablas.

Seán Ó Riain, Prezidanto de EŬROPA ESPERANTO-UNIO
Vidu <http://www.esperanto.net>, <http://www.lingvo.org>
kaj <http://www.lernu.net>

Premio Ada Sikorska-Fighiera Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo—Salou, Hispanio, 2-9 Oktobro 2004

La Organiza Komitato de la Internacia Esperanto-Semajno decidis starigi jaran premion je la nomo de ADA SIKORSKA-FIGHIERA, destinitan al esperantist/in/o akirinta gravajn meritojn en sia poresperanta laboro. Ĝi konsistas el medalo, sur kiu, krom la nomo de la INTERNACIA ESPERANTO-SEMAJNO, aperos reliefa bildo de Ada Sikorska-Fighiera kaj, dorse, la gravurita nomo de la premiito, dato kaj loko de la Semajno.

Celo. La premio celas publike agnoski gravan kaj sindeciĝan laboron por la bela ideo de esperantismo faritan de samidean/in/o el iu ajn monda parto. Donante al la Premio la nomon de la forpasinta kaj ĉies amata Ada, kiu ĝis sia morto konstante laboris por Esperanto, la Organiza Komitato intencas stimuli la esperantistojn sekvi ŝian noblan ekzemplon je la servo de nia kara idealo.

Kandidatigoj. La proponoj por la premio devas esti alsenditaj de loka, nacia aŭ internacia Esperanto-Grupo, Klubo, Societo aŭ Organizo, antaŭ la 1^a de septembro 2004, al la prezidanto de la Premia Komisiono: Gian Carlo Fighiera, Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (To), Italio. Fax: (+Italio) 11 226 30 78.



Esperanto kaj Filatelio

Ĉu interesas al vi la historio de Esperanto laŭ filatela vidpunkto? Ĝin malkovru danke al laboro de ELF-AREK, aliĝinta faka asocio de UEA, kiu arigas personojn kolektantajn kaj filatelaĵojn (poŝtmarkojn, tutaĵojn, stampojn, k.a.) kaj ĉiaspecajn esperantaĵojn (glumarkojn, eks-librisojn, fotojn, ilustritajn bildkartojn, insignojn k.a.).

Ĝi estis fondita en la jaro 1968 kun la celo informadi pri Esperantaj filatelaĵoj kaj glumarkoj; diskonigi Esperanton inter la filatelistoj; per sia stampobanko helpi la kolektantojn. Organo DE ELF-AREK estas LA VERDA LUPEO, kvar-monata revuo, redaktata de Rudolf Burmeister el Germanio. Ekzistas krome tre ampleksa katalogo, zorge ĝisdatigita, kie estas enlistigitaj ĉiuj stampoj aperintaj tra la mondo ekde jaro 1912^a, ĉiuj poŝtmarkoj, poŝtaj kartoj kaj tutaĵoj, glumarkoj (ekde 1887) kaj multon plian ankoraŭ, ĉion kompreneble rilate al Esperanto.

Membroj troviĝas dise tra la tuta mondo kaj interrilatas amike por kune kontribui al neperdo de grava dokumentaro priesperanta kaj per ĝi "konstrui" la historion de nia movado aĝanta jam preskaŭ 120 jarojn.

Pliajn detalajn informojn donas
ELF-AREK-vicprezidanto Elda Doerfler

Inform-artikoloj ŝuldeblas al RET-INFO, NUN kaj NOVA SENTO.

BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Sidejo: Via del Coroneo 15 - 34133 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128

Reto: esperantotrieste@adriacom.it; nored@tele2.it
<http://arte.triesteincontra.it/esperanto>

Poŝta adreso: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro - Italio
Poŝtekkonto N° 10834349